

# LA JUNA VIVO



## MONATA ORGANO POR LERNEJANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

### Karaj Lernejanoj,

Dum mi preparas ĉi tiun numeron de „La Juna Vivo” la pluvego frapas sur miajn fenestrojn kaj la vento blovas la lastajn foliojn for de la arboj. Nun estas aŭtuno. Ho, estas bone nun esti en la hejmo! Tie brulas la forno kaj la lampo jam frue lumas. Ni ĉiuj sidas ĉirkaŭ la tablo aŭ ĉe la forno kaj ni faras planojn por la decembraj festoj.

En ĉi tiu numero nederlanda knabo rakontas al ni, kiel li en la antaŭa jaro festis „Sanktan Nikolaon”. Kiu el vi konas tiun feston?

Je la 11-a de novembro oni en Nederlando festas „Sanktan Martinon”. Tiam la infanoj en multaj lokoj marŝas kun belaj lanternoj tra la stratoj kaj kantas. En West-Grafdijk la infanoj ofte mem faras tiajn lanternojn el betoj. Ili faras la beton kava kaj tranĉas en la ŝelo belajn figurojn. Tiam ili metas kandelon en ĝin kaj havas belegan lanternon. Ili vizitas ĉiujn domojn kaj kantas tie. Tiam ili ricevas frandaĵojn.

Ĉu vi konas aliajn festojn? Ĉu jes? Tiam skribu al mi! Ĉu vi ne estas bona esperantisto? Ne gravas! Eble alia esperantisto povas helpi vin! Ne timu! Mi atendas multajn verkaĵojn!

N. K.

„Kio estas tio???” — La vortoj en la „teksaĵo” (vidu la antaŭan n-ron de LJV) estas: Vera amikeco similas rozon sen dornoj. Esperanto servas ĝin.

(Mary Mawer, Marion Looseley, Dorothy Foreman, John Mees, John Cripps, ĉiuj de la Wrotham Hill School en Britujo: Vi bone legis la vortojn! Dankon pro viaj kartoj! Ni ankaŭ ricevis solvojn el Germanujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Francujo.)




## NIA VERKILO.

Kiu??

Kion faras??

Kie??



Kiu??  
La bakisto

Kion faras??  
bakas

Kie??  
en la bakejo

Ĉu vi komprenas? Skribu ĉe la aliaj bildoj frazojn en 3 partoj. Sed skribu ankaŭ aliajn frazojn!

La bakisto estas juna. — Lia ĉapelo estas blanka.  
Sur la breto estas la panoj.

1.




Kiu??

Kion faras??

Kie??

.....  
Kaj aliaj frazoj estas:

2.



3.



4.



5.





Kelkaj bestoj faras vintro-dormon: erinaco, vesperto kaj multaj aliaj.

La vesperto metas siajn flugilojn ĉirkaŭ sian korpeton kaj premas sin kontraŭ muron. Ŝajnas, ke ĝi estas senviva, sed ne, ĝi ne estas tia.

Antaŭ ĝia dormo ĝi manĝis multajn insektojn. La ventreto estas plena kaj ĝi ne malsatos.

Sciuro agas alie. Ĝi serĉas fruktojn de pinoj kaj fagoj kaj kaŝas ilin. Tiam ĝi serĉas kavan arbon kaj ekdormas en ĝi. Sed kiam ĝi sentas malsaton, ĝi eliras. Ĝi serĉas la lokon, kie ĝi kaŝis la fruktojn, kaj manĝas, ĝis la ventro ree estas tute plena.

Loes Slegt (3-a klaso)

(Trad. el la lerneja gazeto de la elementa lernejo en Edam, Ned.).

### La Pariza Zoologia Parko.

Ciuj lernantoj de nia lernejo vizitis Parizon. La zoologia parko tre plaĉis al ni.

En la unua aleo estas tre kuriozaj papagoj. Ili havas tre belajn kaj tre diversajn kolorojn. Kompatindaj bestoj! Ili certe tre enuas sur sia apogilo.

Pli poste estas la grandaj kaj sveltaj ĝirafoj. Kia longa kolo! Per sia lango ili lekas la apudan rokon, kvazaŭ ili volas montri al ni, ĝis kie ili povas atingi. Ni profitas la momenton por fotografi ilin.

La tri elefantoj estas tre amuzaj. Ni iras al la plej dika. Marcelle donas al ĝi pecon da pano. Per sia longa rostro ĝi klopodas atingi la panon. Sed nia amikino iom timas kaj faras paŝon malantaŭe. La bestego kredas, ke oni mokas ĝin, kaj foriras.

Kaj jen, nun, la roko. Tie svarmas la simioj! Kiom estas? Ni ne scias kaj ne povas nombri, ĉar ili senĉese saltas, falas, grimpas. Unu el ili havas malnovan tukon en sia buŝo kaj kviete maĉas ĝin. Subite alvenas alia simio. Ĝi volas ŝteli la tukon!



Ili persekutas unu la alian kaj de roko al roko ili saltas, kvazaŭ ili volas distri la vizitantojn.

Simiino portas sian idon jen sur la dorso, jen sub la ventro, kaj tre rapide kuras.

Kelkaj simioj sin gratas; ĉu pro puloj? Aliaj grimacas.

Kiom amuzaj ili estas!

(Verkita laŭ la Freinet-tekniko).

### Kiel ni festis „Sanktan Nikolaon”.

Mia kuzeto, mia frato kaj mi kun miaj kuzino kaj geonkloj kaj tiel plu, sidis ĉiuj apud la kameno. Sankta Nikolao ja venos, el Hispanujo! Ni decidis kanti por li en Esperanto. Post kelkaj ordinaraj kantoj, kiel „La floroj de l' ĝardeno” la kuzeto (6-jara kaj kredanta) kantis en Esperanto:

Nikola' Kapuĉo,

Donu en boteto!

Donu en la kruĉo!

Dankon, Nikolaeto!

Subite pluvas tra la plafono multaj kuketoj ..... La knabo mire ĉirkaŭrigardas, sed ne vidas homon.

Je la sepa horo ni ĉiuj kantis:



Jen venas ŝipego el land' Hispani';  
Kondukas Nikolaon, Sanktulon, al ni.  
Ĉevalo la blanka, la bona de li  
Nun portas donacojn el land' Hispani'.

Jen ridas nigrulo, servisto, al ni;  
Li krias de fore: „Donacoj por vi,  
Obeaj infanoj! ... Ho ve, tamen nun  
La malobeemaj, vi pensu pri pun'!”

Infanoj, la bonaj, dankemaj en kor',  
Infanoj malbonaj ne estas trezor'.  
Ni tamen kondukis laŭ Lia dezir'.  
Kaj restis sen puno de sankta la vir'!

Nu, neni malaperis en la sakon de Petro, la servisto. Ĉiuj ricevis belajn donacojn. Kaj Ervin, la kuzeto ree kantis la arieton „Nikola' Kapuĉo” kaj li ricevis kroman dolĉaĵon.

Jaĉjo Oldenburger (12-jara), Amsterdam, Nederlando.



**Noto de la red.:** En multaj lokoj en Nederlando oni je la 5-a de decembro festas la naskiĝtagon de „Sankta Nikolao”. Junaj infanoj kredas, ke li kun sia servisto („nigra Petro”) venas el Hispanujo por doni donacojn al obeemaj infanoj. Nokte li sur blanka ĉevalo rajdas sur la tegmentoj kaj la servistoj metas donacojn en la korbojn, kiujn la infanoj metis ĉe la fornon.

Ĉu ankaŭ en aliaj landoj ekzistas tiaj naciaj festoj? Sendu verkaĵojn pri ili!!!

### Du malgrandaj grajnoj de tritiko (daŭrigo).

Tiel kriis Burĝono jam multe. Ĝi estis plena de vivoĝojo. Kiom ĝuis ĝia juna menso, kiam la vento fleksis ĝian kapeton kaj ĝian tutan tigon, jen dekstren, jen maldekstren, jen antaŭen, jen malantaŭen kaj .....

Nu ja, Burĝono volonte suprensaltus el la tero kaj kunirus kun la vento, kien ajn ĉi tiu portus ĝin.

„Mia kara amiko!” flustris Spiko. Vi neniam pensas pri la celo de via vivo! Se vi kondukas tiel, vi neniam povas plenumi la taskon de via ekzistado. Puŝu viajn radikojn en la teron, pli kaj pli profunden, anstataŭ ol koketadi vian propran ĝojon. Per viaj malfortaj radikoj vi ne povas nutri vin sufiĉe. Vi ne akiros sufiĉe da vivoforto por la lukto de la vivo. Mia kara amiko, aŭskultu mian bonan konsilon! Sekvu ĝin!”

„Hu! Kiom serioza vi estas!” respondis la ĉiam ventanima Burĝono kaj ĝi ne atentis la konsilojn de Spiko.

„Krome”, daŭrigis Burĝono, la tero estas tro malmola. Kial oni ne pli bone preparis ĝin antaŭ la semado? Ne! La vivo estas tro mallonga! Kial pensi pri la seriozaĵoj, se ĉie estas ĝojoj!”

Tiel Burĝono pensis kaj balancis sin en la vento. Ĝiaj malfortaj radikoj nenjel enpenetris en la teron. Oni ja tamen povas teni sin!

La tempo pasis. Venis la aŭtuno. Kun la aŭtuno venis falĉisto al la kampo. Li komencis falĉi. La falĉilo susuradis kaj amase falis la tritiko sur la kampon. Jam venis la vico al la loko, kie staris Burĝono kaj Spiko. Burĝono estis malgranda, kaj malforta. Spiko, kontraŭe, estis pli alta ol ĉiuj aliaj grajnoj.

„Nun gardu vin, Burĝono!” ekkriis Spiko. „Firme kaptu la teron! La falĉisto tuj estos ĉe ni. Se viaj radikoj elteriĝos, li povos forĵeti vin. Kaj tiam ni devos forlasi unu la alian, por ĉiam! Nun! .....

La falĉisto alvenis. Eksusuro! ..... Burĝono kaj Spiko kuŝis sur la kampo. Sed bedaŭrinde la radikoj de Burĝono disiĝis el la tero. Ĝi kuŝis sur la kampo kun elstarantaj radikoj, inter multaj aliaj bonaj tritikaj tigoj. — Tamen oni ne forĵetis Burĝonon.



La aŭtuno forpasis. Ankaŭ la vintro. Kaj nova printempo kunportis novan vivon en la kestegon de la grenejo.

Denove la farmisto venis en la grenejon, kun semujo en la mano. Li plenigis la ujon per grajnoj de tritiko kaj iris al la kampo. Ĉe la kampo la farmisto haltis kaj metis la ujon sur la teron. Li komencis serĉi inter la grajnoj kaj forĵetis kelkajn malproksimen, en ŝlimakvejon!

„Tiu ne taŭgas. El ili kreskos nenio!” Tiel parolis la farmisto. Tiam li prenis la semujon kaj komencis semi la bonajn grenerojn.

Ĉiuj grajnoj, kiujn la farmisto forĵetis en la ŝlimakvejon, estis idoj de Burgono. Ili neniam fariĝis io!

Lauri Lehtola, Turku, Finnlando.

### Proverboj.

Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.

Se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos.

Ĉiu komenco estas malfacila.

Lernu juna por esti saĝa maljuna.

Kiu koleras, tiu perdas.

El „Proverbaro Esperanta” de L. L. Zamenhof.

### T.J.O.-Kunveno 1950 en Konstanz (Germanujo).

Bedaŭrinde ni ĝis nun ne povas doni multajn informojn.

Stariĝis loka organiza komitato, sub la patroneco de la ĉefurbestro. Momente ĝi esploras la eblecojn por loĝado kaj ekskursoj, kaj laŭ tio fiksos la partoprenkostojn kaj daton.

Al grupoj la germanaj fervojoj donas rabaton de 50 %, do estas konsilinde vojaĝi karavane el la diversaj landoj.

La adreso de la loka komitato estas: Grüngang 9, Konstanz a.B., Germanujo. Petante informojn oni bonvolu aldoni respondkuponon.

### KONKURSRUBRIKO.

#### Raportoj:

1. Raporto ne ricevita.
2. Mi ricevis dudek (20) provojn, el kiuj dek kvin (15) estis tute seneraraj. Tamen mi devis aljuĝi la premion al **Robert Fraser** (Kirkaldy, Skotlando) unue, ĉar li lernas hejme kaj ne povas dis-



kuti la problemon kun kamaradoj; due, ĉar li havas propran sistemon, per kiu li tre klare montris la solvon; kaj trie, li estas la plej juna konkursanto — 10-jara! Korajn gratulojn! G. Moir.

3. Estis tre malfacile decidi al kiu doni la premion, ĉar tiom da interesaj verkaĵoj atingis nin. La vere plej bonaj venis de jam bone konataj konkursantoj: **Dorothy Kilgour (Birmingham, Brit.)**, **Jill Farrar**, **Brenda Barness**, **Gladys Newman**, **Jean Dawson (Whitburn, Brit.)**.

Cio interesis nin, sed fine ŝajnis al ni, ke estos bone doni la premion al iu, kiu lernis dum malpli da tempo ol la jam nomitaj; do **James Bawn (Whitburn)** gajnis la premion. Ni ĝojas, ke tiom da knaboj ensendis verkaĵojn ĉi tiun fojon, kaj ni esperas, ke venontfoje ni ricevos verkaĵojn ankaŭ el aliaj landoj! J. A.

**Konkursreguloj:** Skribu klare: 1. vian nomon; 2. vian naskiĝdaton; 3. dum kiom da tempo vi studis esperanton; 4. la nomon aŭ specon de via lernejo; 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

**Premioj por Konkursoj:** Britoj povas ion elekti el la katalogo de la Brita Esperanto-Asocio ĝis la valoro de 2 ŝ. 6 p. por Konkurso I; ĝis la valoro de 3 ŝ. por Konkursoj II kaj III. Adreso: 140, Holland Park Avenue, London W II. En aliaj landoj la premio-gajnintoj devas elekti unu libron el jena listo: Konkurso I: „Esperanto por Infanoj” (Salomon), legolibro, aŭ „Komuna Kantlibro” (Holmes), kantoj kun muziko. Konkurso II: „Tejo kaj Ĉerik” (Toms), historietoj, aŭ „Johano kaj Silvio” (Betts), legolibro kun angla vortaro, aŭ „Neĝulino” (Grimm) aŭ libro el Konkurso I-listo.

Konkurso III: „Kudlago, la malgranda Eskimo” (v. Hichtum), aŭ „Pinokjo” (Collodi) aŭ „La Nova Testamento” aŭ libro el la listoj por I kaj II.

Kiam vi scias, ke vi gajnis premion, skribu tuj al la brita Esperanto-Asocio kaj sciigu tion. Elektu la libron, kiun vi preferas.

#### **I-a grado (ĝis dujara lernado):**

VALFA LORFO! Kion ĝi signifas? Ha! la literoj estas en malbona ordo; en pli bona ordo la vortoj estas: FLAVA FLORO.

Nu, via tasko estas trovi la signifon de: anĝri toka; kalban donhu; ĉefila banko; albe nakobin; adki borli.

Ensendu vian provon antaŭ la 10-a de decembro al: f-ino Booy, 96 Mansell Road, Birmingham 10, Anglujo.

#### **II-a grado (ĝis dujara lernado):**

Kvankam mi ne estas forta matematikisto, tamen nombroj tre interesas min, ĉar ili pensigas min pri kolektoj. Ĉu ankaŭ vin? Ekzemple: **Tri** pensigas min pri **la tri ursoj** en fabelo. **Dek unu** pensigas min pri **futbalantaro**.



Nu, jen via vico! Pri kio la sekvantaj nombroj pensigas vin?  
2, 3, 4, 7, 10, 11, 12, 13, 21, 28, 31, 40, 49; 52; 100, 365. —  
Faru tiom kiom vi povas kaj uzu por viaj frazoj la formon de mia ekzemplo.

Ensendu vian provon antaŭ la 10-a de decembro al s-ro G. Moir, 44, Francis Street, Fulwell, Sunderland, (Anglujo).

**3-a grado** (por ĉiuj): Se vi povus iĝi besto, kiun beston vi elektus kaj kial?

Sendu vian provon antaŭ la 10-a de decembro al: s-ino Anwell, 1 Belle Grove West, Spital Tongues, Newcastle-on-Thyne 2. Anglujo.

### KORESPONDADRESOJ.

**Anglujo:** 40 knabinoj, 13-14-j. urĝe dez. gekorespondantojn speciale el Nederlando aŭ Francujo. Resp. certa. Skribu al F-ino M. E. Harris, Canterbury Road School, Handsworth, Birmingham.

22 knabinoj, 13-14-j. de E-klaso en Newcastle on Tyne, dez. kor. kun gesamaĝuloj el ĉiuj landoj. Skribu al s-ino Anwell, Rutherford High School, Newcastle-on-Tyne 4.

G. O. Crawley, Sutton-Granby, Notts., sola esp-isto en izolita vilaĝo interŝ. angl. il. ĵurnalojn por Esp. libretoj aŭ ĵurn., aŭ poŝtm. k.l.f.m.

**Brazilo:** Brazila Junular-Organizo (TJO-sekcio) organizas propagandan ekspozicion. Oni urĝe petas la alsendon de gazetoj, il. poŝtk., librojn, prospektojn, ktp. Adr.: L. Bartholomeu, Caixa Postal 232, Baura, Est. de Sao Paulo. Ĉiu sendinto ricevos memordonacon (Pro manko de materialo la ekspozicio jam devis esti prokrastata).

**Bulgarujo:** Nikola At. Kolovski, v. Lehĉevo, Mihajlovgradsko, 19-j., deziras korespondi kun la tuta mondo.

**Ĉeĥoslovakujo:** Letervesperon por 100 komencantoj, aranĝos la Esp. klubo en Cheb, poŝtkesto 2. Ĉiu skribinto ricevos valoran propagandilon pri ĈSR. Ladislav Strakoš (15-j., kaj dum 5 monatoj malsana) petas korespondadojn el ĉiuj landoj. Ostrava, Radvanice 731.

**Francujo:** F-ino Prisca Roudaut, (23-j.), Rue de l' Eglise, Hydrequent-Rinscent (P.d.C.) dez.kor. kaj interŝ.pk: k.pm. k.ĉ.l.: Resp. certa.

**Germanujo:** 18-j. kursanino dez.kor. pri geografio kaj aliaj temoj kun ĉiuj landoj. Rosmarie Meitin, Konstanz, Friedrichstr. 14.

**Hispanujo:** R. Sorolla, str. Torrente vidalet, 13, 1° — la, Barcelona (G), dez. interŝ.pm.k.ĉ.l. Resp. certa, se estas per rekomendita letero.

**Japanujo:** 17-j. lernanto dez.kor. kaj interŝ. bildkartojn kun nederlandanoj. Yamamura-Kimilosi, Asakayama-tijo-2-35, Sakai-si, Oosaka-hu.

**Nederlando:** Ben Menge, Bolwaterstr. 39, Venlo, dez.kor. kaj interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Inĝ. B. B. de Regt, c.i. direktoro de teĥnika mezgrada lernejo „Technicum”, Eendrachtsweg 26-27, Rotterdam, petas por siaj 45 knaboj (14-17-j.), kiuj devige lernas E-ton en la lernejo, korespondantinojn el la tuta mondo. Aldonu vian aĝon, kaj mi disdonos la leterojn. Mi petas, ke aliaj gazetoj kopiu ĉi tiun anoncon, por ke venu multaj leteroj, por instigi mian knabaron.

Ĉiu, kiu sendos al mi karton pri ventmuelilo, ricevos karton pri nia regiono, (nur eksterlandanoj). E. v. Walsum, Fop-Smitstr. 68, Alblasserdam.